

Christian Morgenstern,  
Renkonto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni sidis ĉe du tabloj - lok' ? - en mond' ...  
Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!  
Ni sidis ie en la vivoregno...  
Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,  
se mi en ĉi okulojn versi rajtus -  
se rekompencus min ĉi reĝa buŝo -  
kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,  
pro kio vi profunde min ekscitas -  
ke mi genuojn viajn amus braki -  
kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.  
Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -  
kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -  
eliris - kaj nin plu neniam vidis.

*Traduko de la Germana poemo "Begegnung" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 - †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*